

# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

sabaton, la 7an de Julio, 2017 • numero kvin

## Hodiaŭ

- ★ 7:15 atm: Matenmanĝo
- ★ 8:30 – 12:15 ptm: Lecionoj (Alexander, Kováts, Löwenstein)
- ★ 12:15 ptm: Tagmanĝo
- ★ 2:00 – 3:30 ptm: Ekzercado kun Katalin
- ★ 2:00 – 5:00 ptm: Lecionoj (Vergara)
- ★ 5:30 ptm: Vespermanĝo
- ★ 7:00 – 8:15 ptm: KTF: Diskuto kaj analizo de mallongaj filmetoj *Flowe 110*
- ★ 8:00 ptm: JuveLina - La Arto kaj Tekniko de Vitraĵoj - Katalin Kováts *klasĉambro de Katalin*
- ★ 8:45 ptm: Gufujo



## Angulo de la verkemulo: Kobolda vespermanĝo

de Anonimulo, lernanto ĉe NASK

Li neniam atendis vidi unu el la feoj laboranta en la kafeterio, sed tie ŝi staris, ia ter-gnomo aŭ koboldo, ŝia hararo ligita en reto kaj malrida sur la vizaĝo.

Li prenis teleron kaj montris al la koboldo sian manĝkarton. Ŝi prenis ĝin de li kaj metis ĝin en sian maŝinon. “Tiu estas la lasta manĝo sur via karto. Ĉu vi volas replenigi ĝin?”

“Ne nun, dankon: mi estas iomete senmona.”

“Bone. Ĉu vi volas la fiŝaĵon aŭ la kokajaĵon?”

“Ah, la fiŝaĵon. Mi ne pensas, ke mi iam antaŭe vidis, vi scias, koboldon laborantan ĉi tie.”

Ŝi eligis etan suspiron. “Ne, mi kutime laboras kun la alia skipo. Ĉu rizon aŭ terpomojn vi volas?”

Nu, estas bone vidi vian popolon proksima.

“Mi diris, ĉu rizon aŭ terpomojn?”

“Ho, rizon, mi petas.” La koboldo metis kuleron da rizo sur lian teleron, eble pli forte ol necese. “Do, kiam via deĵoro finiĝos?”

Ŝi skuis la kapon iomete. “Kial?”

“Mi pensis, ke eble ni povus, vi scias, umi kune. Ni povus spekti filmon, ĉu ne?”

Pri tio ŝi rulis la okulojn. “Vi ĵus diris al mi, ke vi estas senmona.”

“Nu, eble...”



“Ne”, ŝi diris. “Nur ĉesu. Karotojn aŭ pizojn?”

Ho”, li diris, kaj klopodis montri malgrandan rideton. “Karotojn, mi petas. Ĉu eble mi vidos vin ĉi tie morgaŭ?”

La koboldo rigardis lin rekte en la okulojn kaj graŭlis minace, “Ne, ĉar hodiaŭ estas via lasta tago.”



Tatiana kaj Charlotte montras siajn LEGO-kreaĵojn. Ili fotiĝis por projekto de Alekso MILLER. Alekso ŝatus foti ankaŭ vin kune kun LEGOaĵo kreite de vi. Demandu al li por pli da informo.



Lastatempe en Usono oni malpli ofte instruas al lernejoj, kiel manskribi kursive. Eĉ en antaŭaj jaroj, kiam preskaŭ ĉiuj skribis kursive, kelkfoje estis malfacile legi la skribaĵojn de iuj.

Jen manskribita dediĉo el ekzemplero de la libro *Argenta Duopo*. Ĉu vi povas legi ĝin? Ĉu vi rekonas la nomojn de du el la plej famaj Esperantaj verkistoj?

# Angulo de la verkemulo: Magia lingvo

de Rachel ELIASON

Rachel inspiriĝis de la frazo:

**La knabino paŝis super la kadavron de la sorĉistino kaj diris, “Mi ja avertis vin, ke oni ne provu tuŝi min.”**

El alia ĉambro voĉo sonas: “ĉu vi estas preta por nia vojaĝo?”

“Panjo!” ŝi krias laute, “Mi jam pakis!”

“Iru, helpu vian fraton. Ni neniam alvenos al NASK je la ĝusta horo. Kaj memoru kion via patro diras: ne krokodilu!”

Katio prenas sian sorĉistan pupon kaj jetas ĝin preter sian ŝultron. “Mi ja krokodilos se mi volos.” Se Katio krokodilus, ŝi parolus nek la stultan anglan nek la pli bonan hispanan, kiun ŝia amiko Margot parolas. Ne, ŝi parolus la sekretan magian lingvon, kiun nur Katio scias.

La vojaĝo al NASK estas tre longa. Patro aŭtas. Patrino ĉiam bakas manĝetojn kaj donas ilin al la gefratoj, ĉu ili volas aŭ ne.

Ŝia frato ĝenas ŝin la tutan tempon.

“Ne tuŝu min!” ŝi krias.

“Mi ne tuŝas ĝin,” li mensogas, lia mano nur unu centimetron for.

Katio koleriĝas. “Se vi tuŝos min denove, mi ja krokodilos. Mi diros la sekretan vorton kaj ŝanĝos vin en ranon!”

Ŝia frato ploregas. “Katio minacas min,” li diras. “Ŝi ŝanĝos min en ranon.”

“Ne minacu vian fraton,” Patrino diras.

“Mi uzas mian sekretan lingvon,” Katio diras.

“Ne krokodilu!” Patro krias.

Neniu ĝuas la vojaĝon. Tute ne.

Ĉe la kunveno, estas kiel kutime. Plejparte komencantoj kaj progresantoj estas tie. Paĉjo instruas kaj Panjo helpas la orgizantojn. Nur kelkaj denaskuloj ĉeestas. Eĉ malpli havas similan aĝon, kiel ŝi. Unu knabo, Rafo, diras, “se ‘krokodili’ signifas ‘paroli la propran lingvon anstataŭ Esperanton,’ kaj Esperanto estas la propra lingvo, ĉu oni neniam krokodilu aŭ ĉiam krokodilu?”

Katio ne volas pensi pri tiu aĉa stulteco, do ŝi iras for. Ŝi restas sola por ekzerci kaj paroli sian propran sekretan magian lingvon. En korto ŝi trovas sciuron. Ŝi tre ŝatas la sciuron kaj rapide amikiĝas kun ĝi. Ŝi pensas kaj kreas novan vorton por sia sekreta magia lingvo. La vorto malgrandigas ŝin ĝis ŝi havas la saman altecon kiel la sciuro. Nun ŝi povas rajdi la sciuron tra la heĝon kaj trans la universitaton. Tio tre plaĉas al ŝi.

En la plej malproksima angulo de la universitato, granda hundaĉo surprizas ŝin kaj ŝian novan sciuran amikon. La sciuro saltas kaj forjetas Kation.

Katio ne ŝatas kutimajn hundojn. Ŝi preferas katojn. Ŝi estas Kat-i-o, kaj tre similas al kato, ŝi pensas. Sed tio ne estas kutima hundo, ĝi estas granda aĉa hundo. Ĝi povus manĝi Kation per unu mordo.

Ŝi ektimas kaj tremas. Ŝi tute forgesas la sekretan magian vorton por regrandiĝi.

La hundo venas proksimen. Katio krias laŭte. Ŝi memoras la vorton, sed ne la “mem” parton. Do ŝi ne grandiĝas, sed proksima folio kreskas gigante. Ŝi prenas la folion kaj batas la hundaĉon. Tio ne vundas aŭ eĉ doloras la hundaĉon, sed tre konfuzas ĝin. Ĝi haltas. Katio parolas la ĝustan vorton, grandiĝas, kaj eskapas.

Ŝia paĉjo finis sian klason, ĝuste tiam, kiam Katio alvenas en la gufujon. Ŝi jetas sin en liajn brakojn. “Mi ne plu krokodilos!” ŝi ploras. “Neniam!”

“Freneza knabino,” li diras. “Vi ĝenas min kaj konfuzas min. Sed mi tre amas vin.”

Kion vi pensas? Ĉu vi kredas mian rakonton?

Ĉu Katio vere neniam krokodilos? Aŭ ĉu ŝi denove parolos la sekretan magian lingvon, kiun nur ŝi scias?

## Trovu la vortojn

de Makis, el *Vortenigmoj: Bazvortprovizo*

AKURAT'

AŬTUN'

BROKANT'

DAŬR'

EĤ'

FART'

FROMAĜ'

INSTRU'

KARTON'

KASEROL'

KONFIRM'

KUN\*

LONG'

MINIMUM'

NUMER'

PASI'

PO\*

PUGN'

RIMED'

SILENT'

STULT'

TEĤNIK'

TUR'

VOLONT'

A O N U K U F A A K N L N L R  
 U N R R Ĝ E K T A P K R T U K  
 M R U M A I O R R K K N D L I  
 T D T U P Ĥ T T O K U F O E V  
 R I E S O O T N A K O R B A I  
 O O Ĥ M N K F N T Ŭ E O A Ŭ T  
 M E N N I I I V E S D M A T O  
 P A I R R R O A A L Ĝ A L U L  
 M U K M S L P K G Ĝ I Ĝ Ŭ N I  
 I U G I O A S F A S R S U R E  
 U T O N S R A F A R T M T N N  
 N T T I O R O O O U E Ĥ N U N  
 M R I M T L N R L R K N A T A  
 U Ŭ L U R N M T N T T K S G O  
 L U M M N M A E O N O E N U S